

NORMANDA ESPERANTO-BULTENO

FN PERANC 47
Pother

BULLETIN TRIMESTRIEL = TRIMONATA BULTENO N° 20
MAJO 1972

Redaktas: S-ro JOUIS E. 62I Rue Georges Mugnier - 76 BOISGUILLAUME.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10a de Februaro, 10a de Majo,
10a de Aŭgusto, 10a de Novembro.

EN H A V O.

Varbu pri Esperanto.

Kongreso de la Normanda Federacio en Vire.

Kotizoj. (Korekto de eraroj.)

Sugesto pri senpaga informado.

Kongreso de Unuiĝo Normanda de la Esperantistoj.

Antaŭ la Ruena Kongreso.

Vivo de la Grupoj.

VARBU PRI ESPERANTO.

Multe varbi pri Esperanto estas urĝega kaj gravega afero!, kaj estas la afero de ĉiuj Esperantistoj. Ni devas serĉi la plej bonajn formojn de varbado, kaj estas multaj ideoj. Kiam ni trovas bonan ideon ni devas disvastigi ĝin ĉe niaj gesamideanoj, fare de la grupoj, de la gazetoj aŭ pli simple de la korespondado.

La okazoj estas multaj: kiam ni vidis ĉe la televido elsendon pri la radio-amatoroj kun ebleco por alvoki telefone, mi demandis kial la radio-amatoroj ne uzas internacian lingvonkiel la Esperantan. Se kelkaj el niaj samideanoj vokus kiel mi; la afero trapasus televidon! Ni ankoraŭ povas demandi informojn esperantlingva al turistaj oficejoj al firmaoj eksterlandaj, kontakti grupojn ne-esperantistajn: En Le Havre ni provas fari esperantan grupon en la Junulardomo kaj planas ekinterrilati kun grupoj neesperantistaj kiel: foto-grupo, radioamatora, speleologa aŭ muzika. Le Havre estas ĝemelita kun Leningrad, se ni provas preferinde pri tiu urbo fare de la delegitoj aŭ de la grupoj.

Mi intencas skribi al la esperantistaj blinduloj en Varsovio pere de Radio Varsovio por demandi ĉu ili bezonas informojn pri la blindula grupo en Le Havre kaj poste mi iris ĉe la blindulojn el Le Havre kaj konatigis ilin kun esperanto.

Ni povas fari same kun aliaj esperantistoj.

Kiam ni havas varbiloj aŭ uzmaniero skribita en multaj lingvoj ni povas traduki ilin esperantlingven kaj sendi al la presanta firmao. Se multaj el ni farus same ili alpresus esperantan trunkon.

Ni ne estas tre multaj, sed ni devas esti agemegaj kaj tial ni disvastigos Esperanton.

Ni ne estas tre multaj, sed ni devas esti agemegaj, kaj tiel ni dis vastigos Esperanton.

Ni devas pruvi al la neesperantistoj, ke Esperanto estas utila lingvo, ne nur vidaĵo de la spirito, sed utila afero kun praktika uzado. Tiam la homoj lernos Esperanton, kaj poste, anstataŭ forgesi ĝin, kiel okazas ofte pro la neuzado de la lingvo, ili trovos bonajn rimedojn por solvo de problemoj en la internacia lingvo kaj utiligos kaj tiel disvastigos ĝin.

Mi, ankoraŭfoje, kredas, ke tio estas la afero de ĉiuj Esperantistoj, ne nur de la gvidantoj! Ĉu vi havas bonajn ideojn por varbi pri Esperanto? Konatigu ilin al la aliaj pere de la Normanda Bulteno !

Antaŭan dankon;

Alain CHAUM.

- INFORMOJ DE LASTA HORO -

Nia prezidantino en Le Havre, S-ino Peltier, antaŭ la referendumo, skribis al la Prezidanto de la Respubliko por demandi al li ĉu Esperanto ne estus la taŭga lingvo por Eŭropo.

Kaj kiam la prezidanto de la respubliko Aŭstrujo, Sinjoro Jonas, venis al "Elysée", ŝi sendis telegramon laŭ la nomo de la grupo por ke li demandu al Prezidanto Pompidou pri Esperanto en la lernejoj. Mi opinias, ke tiaj agadoj multobligitaj fare de la individuaj Esperantistoj kaj de la grupoj povas havi tre bonajn rezultojn ĉe la oficialaj medioj.

A. CHAUM.

- KOTIZOJ AL U.F.E. KAJ AL U.E.A. - (korekto)

En la numero 18 dela bulteno, ni publikigis erare la tarifon de la pasinta jaro.

Jen estas la ĝusta tarifo:

A. Cotisations donnant droit:

1^o) aux cartes de membres U.F.E. - U.E.A.

2^o) aux bulletins " E^o - actualites.

7 Frs.

3^o) à la " Revue Française d' E)

- membre titulaire.

35 Frs.

junior (- 21 ans)

21 Frs.

" docteur

53 Frs

" Bienfaiteur

88 Frs;

" Titulaire à vie

700 Frs

" Donateur à vie

1 060 Frs.

" Bienfaiteur à vie

1760 Frs.

B. Adhesions individuelles à U.E.A.

- membro jarlibro	25 Frs
(- 22 ans)	12 frs 50
" abonanto	50 Frs
(- 22 ans)	37 Frs 50
" subtenanto	75 Frs
dumviva membro	1000 Frs.

Sugesto pri senpaga informado.

Esperantista turisto! Kiam vi troviĝas en eksterlandaj urboj, petu de la Turismoficejoj, aŭ similaj instancoj; (kampadejoj, restadejoj kun pretendoj je internacieco; k,t,p,) la adreson de la esperanto delegito de U.E.A.!

Cu ne estus same lerte ke la Delegitoj deponu sian adreson ĉe tiuj samaj Turismoficejoj?

En favoraj cirkontancoj la koncernataj instancoj konsentos afiŝi la adreson de la Esperantista Respondeculo, ĉe videbla tabulo.

J. Gibaux.

Rimarko de la bultenisto.

La delegito de U.E.A. aŭ la Prezidanto de la Grupo devas ĉiam sin anonci en la urba jarlibro. La turisma oficejo aŭ la hotelestroj ĉiam povis indiki mian adreson al neatendita Esperantisto en Rouen.

S-ro JOUIS.E.

+++++

KONGRESO DE LA NORMANDA FEDERACIO EN VIRE.

Kiel anoncite en la antaŭaj numeroj de nia bulteno, la Normanda Federacio havis sian kongreson en Vire la 25a kaj la 26an de Marto.

Jam dum la sabata posttagmezo la kongresanoj alvenis multnombraj kaj povis admiri la vidindaĵoj de tiu interesa Turbo. Poste ili povis ĉeesti ĉiunokton Esperanto en la preĝejo Sankta Anna, kaj vespere, post la manĝo ĉiuj ĉeestis la gajan distran vesperon kun aktiva partopreno de la fervojistoj.

Dimanĉe matene, en ĉeesto de multaj personoj okzis en la Urbo-domo la laborkunsido; kies tagordo estis tre ampleksa. La kongresanoj unuanime aprobis la moralan kaj la financon raportojn. Tiam oni renovigis la trionon de la konsilio. Estis elektitaj: S-ro Jouis, F-ino Bonnet Fabienne, S-ro Tailpied, S-ro Veron. Poste oni aŭdis la raportojn de la diversaj grupoj kiuj ofte estis sufiĉe kontentigaj.

Post la raporto, la ĉeestantoj diskutis la ideon pri cirkulanta ekspozicio, kaj S-ro Lemarchand proponi ke ĉiu grupo sendu al li la liston de siaj junuloj por organizi renkontiĝojn.

Sinjoro Jouis estis elektita por reprezenti la federacion dum la kongreso en Nantes.

Fine, oni vane diskutis pri la loko de la venonta kongreso, kaj oni adoptis la tekston de la Centrokcidenta mocio.

Post la laborkunsido, la kongresanoj estis invititaj de la deputito-urbestro al honorvino en la urbedomo?

Poste ili kunvenis denove, ĝoje ĉeesti la bankedon, kaj finiĝis la kongreso per tre interesa komuna ekskurso en aŭtobuso tra Bocage Virois.

Jen estas kelkaj proponoj, sugestoj, ideoj por enblovi novan freŝan aeron en la vivon de UNUIGŔ de NORMANDAJ ESPERANTISTOJ

- Plej ofte kiam ĝenerala kunveno de niaj regionaj esperantistaj asocioj okazas kion oni povas aŭdi; nu, raportojn pri la agadoj lastjaraj de ĉiu urba grupo. Sed ege bedaŭrinde tiuj raportoj estas kiel la agadoj: ne tre fruktedonaj kaj ĝojplenaj; la afero stagnas, eĉ regresas en kelkaj lokoj, kvankam sindonemaj personoj sin dediĉas senlace por la disvastigo de nia lingvo. Kaj la kongreso, (kiam ĝi okazas) finiĝas per ĉiama terura malfacila elekto de la venonta urbo en kiu okazos la kvazaŭa simila renkontiĝo.

- Pri la pasinteco oni multe diskutis; pri la rimedoj por solvi la problemoj kaj pri la estontecaj agadoj, plej ofte silento regnas. Oni ne pridiskutis la eblecojn por progresigi estontece la informan, pedagogian kaj praktikan internan vivon de nia asocio; aŭ se okaze tio tamen okazis, oni vere tion faris tre supraĵe.

- La jena kompilita listo de proponoj, sugestoj, ideoj por viviĝi konkrete nian asocion estas farita ne nur por plenigi la tagordon de la ĝenerala kunveno kiu okazos en Rouen baldaŭ, sed ankaŭ por ke oni kritike pridiskutu ĝin.

- Kompreneble ĝi tute ne intencas esti panaceo por solvi ĉiujn problemojn niajn. Multaj proponoj en ĝi, estas nuntempe ankoraŭ utopioj pro nia malforteco. Sed eble kun ĉies helpo, ili povus esti iam plenumataj. Resume, ĝi estis proponata al ĉiu normanda esperantist(in)o por ke ĉiu konsciis ke bone antaŭplanita agado povas esti celtrafa por la progreso de nia movado, de niaj praktika, utila lingva solv-propono.

- Do, la subskribinto esperas ke li ricevos multe da aliaj helppropoj, sugestoj eĉ kritikoj. Nur necesas ke oni bonvolu iom pripensi kiamaniere konkrete antaŭenirigi nian movadon por ke esperanto eniru en la ĉiutagan vivon de ne nur elito, sed ankaŭ en la kutiman vivon de kiel plej ofte multe da personoj.

- Por tiuj kiuj ĉeestos la kongreson en Rouen jam verku kaj pripensu viajn inter-venojn dum la ĝenerala kunveno. La parolvico estos por ĉiu kiu sincere deziras proponi ion novan kaj realigeblan. Por la aliaj kiuj ne povos veni en Rouen, vi bonvolu skribi al la ĉi-suba adreso. La debato ne nur okazos dum la Ruena renkontiĝo, sed ankaŭ daŭros en la venontaj numeroj de Normanda Esperanto Bulteno, por ke ĉiu esperantist(in)o de nia regiono povu partopreni en la serĉado de solvoj por niaj problemoj.

Antaŭdankojn por viaj kunhelpaj proponoj kaj agadoj !

Petro Lemarchand, 43 rue de Lessard, 76- ROUEN.

P.S. : Se vi sukcesos legi tiujn longegajn paĝojn sen ekdormi, gratulojn vi bonvolu ricevi; tamen ne forgesu reagi, kontraŭstari indigne, aŭ plu proponi kaj agi al tiuj proponoj : vivo de nia komuna asocio dependas de la sinteno de ni ĉiuj.

=0=0=0=0=0=0=0=0=0=

- Ĝis baldaŭ en Rouen por la ĝenerala kunveno de U.N.E. !

=====

UNUE : Baza aksiomo (laŭ plena ilustrita vortaro : aserto rigardata kiel evidenta per si mem) :
Normanda Unuiĝo de la Esperantistoj : "U.N.E." = Asocio por ĉiu esperantist(in)o kiu loĝas en la normanda regiono.

- DUE : U.N.E. asocio de ĉiu. Ĝia efektiva vivo estas la rezultato de :
- servoj kaj agadoj de la asocio (asociaj membroj kaj lokaj grupoj) en
informa
pedagogia
aktiva interna vivo
 - bulteno : nepre necesa ligilo inter ĉiuj.
 - kongresa organizado.
 - agadoj de la asocia estraro, de la lokaj grupoj de la individuaj membroj.

Kelkaj rimarkoj pri la kongresoj de U.N.E. :

- ĝi devas okazi kiel plej eble ofte. Almenaŭ ĉiujare.
 - alterne, se eblas, en malsupra kaj en supra Normandio.
 - ke oni pripensu organizi kongreson de tempo al tempo kun alia provinca renkontiĝo (ekz; Norda, Pariza...) por interŝanĝi ideojn kaj por ke la nombro de la aliĝintoj estu iom pli impona ol kutime por la ekstera publiko = propaganda efiko.
 - krom la jara kongreso, pli oftaj regionaj renkontiĝoj devus okazi : Supra k. mal-supra Normandio; fak-renkontiĝoj : gejunuloj, intergrupaj semajnfinoj, pinikoj, kunaj promenadoj, vizitoj por plifirmigi la rilatojn inter la grupoj kaj la izolitaj membroj.
 - organizi seminarietojn pri informado,
pedagogio,
internaj problemoj : interna vivo de la lokaj grupoj,
- kiel progresigi nian movadon, kiel reteni la komencantojn, kiamaniere varbi novajn lernantojn, akceptado de la novbakitaj esperantistoj: broŝuro por nov-aliĝintoj, kiel realigi la malnovajn esperantistojn kiuj forlasis la movadon.....
- elekti la urbon de la venontaj kongresoj du jarojn antaŭe por ne perdi tempon dum la ĝenerala kunveno. La estraro du jarojn antaŭe petas al la diversaj grupoj kie la kongreso povus okazi. Unu jaro antaŭe oni decidas dum la ĝenerala kunveno, jese aŭ ne pri la efektiva okazo (kie) de la venonta kongreso, kiam unu grupo akceptis ĝin prizorgi.
 - ĉu ne estas eble organizi Esperanto-tagon kun surstrata manifestacio kun propagandacelo antaŭ la regionaj radio, televidstacioj kaj tagĵurnaloj. (ekz. kiel okazis sukcese en Belgio lastjare.)
 - ke komunaj ekzamenoj organizataj en la kadro mem de la kongreso okazu.
 - ke oni profitu la okazon por prezenti informan ekspozicion dum la kongrestagoj.
 - ke la tagordo de la ĝenerala kunveno aperu antaŭe en N.E.B. kaj ke ĝi estu precize sekvata.
 - ke la raportoj de la lokaj grupoj pri la agadoj de la antaŭa jaro aperu en la lasta bulteno, ĵus antaŭ la kongreso, por ne perdi tempon pri aŭskultado de (bedaŭrinde plej-ofte)malgajaj raportoj pri la pasinteco. La kongresanaro, kiu (espero)ble antaŭe legis la raportojn, konsentos jese aŭ ne pri ili. = tempo ŝparita.
 - dum la kongreso : ke la kalkulo pri la voĉdonado (elekto de la estraro) okazu samtempe kun la ĝenerala kunveno, sed aparte, por ke tio ŝparu tempon, kaj por ke oni havu la rezultaton ĉe la fino de la kunveno.
 - post la ĝenerala kunveno kaj la kutima bankedo, okazos kunveno de la nova estraro por disdoni la diversajn postenojn inter la novaj membroj elektitaj.

Kelkaj rimarkoj pri la bulteno :

- se eblas eldoni suplementojn al la bulteno :
 - listo de ĉiuj membroj.
 - historio de esperanto en Normandio.
 - statutoj de U.N.E. ...k.t.p....
- ke la raportoj de la komitat-kunvenoj aperu en la bulteno.
- regula rubriko kun la diversaj postenoj kaj la diversaj adresoj de la respondeculoj, por scii al kiu sin turni por preciza demando.
- ke la jaraj kotizoj kun la adresoj de la perantoj por la internaciaj, naciaj, fakaj asocioj regule kaj akurate aperu en la bulteno. Necesas ke la perantoj sendu la kotiztabelojn sufiĉe frue por la apero antaŭ la jarfino. *Severinband*.

.../...

Pri la bulteno (sekvo).

- ke aperu listojn de la radiostacioj kun esperantlingvaj programoj kie oni sin povas turni por peti informojn : celo, plifirmigo de niaj atingoj.
- tutsame por la firmaoj, turismoficejoj kiuj eldonas broŝurojn flugfoliojn kun esp. teksto por ke oni alterne skribu al ili montrante ke la esperantista "popolo" ekzistas.
- peti ke la grupvidantoj kaj la kursgvidantoj sendu la nomojn kaj adresojn de la novaj esp. kaj kursanoj, por ke oni sendu al ili ekzemplerojn de la bulteno intencante abonigi ilin poste.
- sendi la bultenon al aliaj asocioj regionaj interŝanĝante kun iliaj bultenoj.
- havi regulajn rubrikojn : turisma kalendaro, kalendaro de la esp. okazaĵoj, kotiztabeloj, raportoj de la grupoj, k.t.p.....
- nepre necesa konsilo : sendi al la prizorganto de la bulteno sian novan adreson kiam oni translokiĝas. *tu ĝava afero.*
- rubriko konstanta : "laste eldonitaj" : listo de libroj, broŝuroj, flugfolioj, diskoj, esperantaĵoj laste eldonitaj.
- ke ĉiuj rubrikoj, artikoloj, aperu en esperanto. Ne miksi franc- kaj esperantlingvajn artikolojn. Aldoni informojn franclingve sur aparta folio kiel propagandilo facile disdonata.
- kiam U.F.E. eldonas "Espéranto Actualités", aldoni ĝin en la bulteno. Do necesas havi informojn pri eblecoj ĝin aĉeti grandkvante kun rabato.
- starigi ĉiujare kaj ĝin aperi, liston de la perkorespondaj kursoj en francio.
- sendi ĉiun numeron al U.F.E. SAT-Amikaro, Grésillon.
- antaŭ la kongreso : du numerojn antaŭe : aperigo de alvoko por kandidatiĝo al la postenoj de la estraro. unu numeron antaŭe, aĉero de la listo de la kandidatoj kun voĉdonilo por ĝin resendi.
- ke ĝusta listo de la membroj aperu regule. Ĝi estos ĝisdatigata dank'al sliparo. do bonvolu indiki akurate la novajn adresojn de la membroj kiuj translokiĝas kaj tiujn de la novuloj.
- ke oni aperigu de tempo al tempo la adresojn de la lokaj perantoj de la landaj, internaciaj kaj fakaj esp. asocioj. la adresojn de la respondeculoj de la lokaj grupoj.

Kelkaj rimarkoj pri la servoj kaj agadoj de U.N.E.

(1) - Eldonfako.

- eldoni informfoliojn en esperanto pri la asocio kaj ĝiaj celoj.
en la franca lingvo por propagandaj leteroj kaj por disdonado. (vidu informfoliojn de éditions françaises d'espéranto.)
- eldoni malgrandan kantaron por niaj kunvenoj (kompreneble laŭ la sama prezenta maniero kiel tiu-ĉi de la bulteno.) Ne tenas pri presataj kajeroj tre multekostaj por ni, bonkvalitajn oni povas aĉeti en multaj esperantaj eldonejoj.
- konstantajn kongreskartojn (sen dato kaj loko de la kongreso kaj numero de la renkontiĝo) por ke oni povu grandkvante ilin presigi kun preza rimaso.
- leterkovertetojn kun la normanda insigno kaj tiu-ĉi de U.N.E.
- presatajn frontpaĝojn por la bulteno (arte desegnitaj por pli bona glumarkojn pri U.N.E.
- afiŝojn laŭ "sérigraphie" maniero.
- kaŭĉuk - stamilon kun la nomo de U.N.E. kaj ĝia k.ĉ.p. numero.

(2) - Informfako.

- starigi dokumentaran servon kaj informservon kun taŭgaj informiloj.
- gazetaran servon kun kontrolo de la gazet-eltranĉaĵoj por eventuale : rebato celtrafa kaj rapida al kontraŭaj artikoloj.
- de la informfako nepre devas esti gvidata de kompetentaj personoj kiuj devas sekvi la "principojn de Frostavallen". (t.e. : fundamenta principaro de informado pri la internacia lingvo.)
- ke la redaktado de la informtekstoj estu farata kumune.
- disvolvi la surstratajn enketojn kun informa enhavo kaj celo, ĉefe antaŭ la kurssezono.
- starigi cirkulantan ekspozicion, facile portebla, kun paneloj okulfrapaj kun stoko da ekspoziciotaj libroj bone prezentataj. Niaj ekspozicioj devas esti artiste kaj bone ellaboritaj por ke la afero ŝajnu serioza kaj fruktedona.

Pri la informfako (sekvo).

- starigi regionan bibliotekon kun prunteblaj libroj kaj dokumentoj. (La libroj kiuj ne estos en la manoj de la legantoj, servos por la cirkulanta ekspozicio).
- utiligi la sonbendajn servojn de UEA kaj de SAT. Ni povus ĉe ni mem sonbendigi programojn (kulturaj, tekstoj por perkoresponda kurso, distraĵoj...) kaj proponi ilin al tiuj asociaj servoj. Cirkuligi tiujn sonbendojn inter la grupoj kaj fari kopilaĵojn.
- pluraj membroj de nia asocio disponas pri interesaj diapositivoj kiuj temas pri la praktika utiligo de esperanto. Estus necese elekti la plej taŭgajn, fari duoblaĵojn por propagandvesperoj. (Eble utiligi la serion kiun sro Lentaigne eldonis, kaj pruntedoni ĝin la al la grupoj kiuj ilin bezonas por organizi franclingvajn prelegojn kun sonbendo aŭ ne.
- ke spertaj propagandistoj verku kune prelegojn diversajn laŭ la medioj kie oni devas informadi, kaj meti ilin je la dispono de la diversaj grupoj (sur papero kaj sur sonbendo.)
- eldoni informfoliojn (Vidu la paragrafoⁿ pri la bulteno)
- helpi la izolulojn por informadi kie ili loĝas dank'al sendo de prelegistoj, de la cirkulanta ekspozicio, de prelegtekstoj, sonbendoj, serio da lumbildoj... La apudaj lokaj grupoj devus helpi ilin.
- konstanta informado la al la lokaj oficialaj instancoj por sendo de ekzemple "Espéranto Actualités". Necesas listigi la taŭgajn adresojn kie sendi la informilojn = ĝisdatigita sliparo.
- aperigi en la jarlibroj de SAT kaj de UEA anonceton pri esperantista vivo en Normandio kun adresoj kie sin turni por ricevi informojn, kie la grupoj kunvenas kaj kiam, k.t.p.

(3) - Pedagogia fako.

- organizi seminariojn pri la diversaj aspektoj de la pedagogia fako.
- informi en Normanda Bulteno antaŭ la kurssezono pri la diversaj kurslibroj kun komparoj. Kiel elekti la plej taŭgan libron laŭ la kurso.
- starigi rondojn por paroligi la kursfinantojn dum la kunvenoj de la lokaj grupoj. Lingvaj kritikoj kaj konsiloj en Normanda Bulteno.
- disdoni de stipendiojn al kursfinantoj por ĉeesti niajn regionajn kunvenojn aŭ la naciajn kongresojn, tagojn en Grésillon; aŭ donaci librojn al la plej valoraj.
- efektiviĝi ekzamenojn en la kadro de niaj kongresoj.

(4) - Interna, praktika vivo de la asocio.

- organizi konkurson inter la diversaj grupoj kun premioj (libroj, stipendioj por la plej fervoraj lernantoj...) per poentoj por kursoj:
 - lernantoj novaj
 - artikoloj en la gazetoj
 - ekspozicioj
 - novaj membroj de U.N.E....k.t.p....
- impone organizi la Somajnon de Internacia Amikeco.
- ĝemeli sian propran grupon kun alilanda rondo.
- organizi la starigon de novaj fakrondoj en la kadro de U.N.E. : gejunuloj, kolektantoj....
- peti ke diversaj perantoj kaj fakdelegitoj sin proponu en la kadro de U.N.E. kaj en la diversaj internaciaj organizaĵoj.
- malfermo de ora libro, de fotoservo, kaj de vera arkiva muzeo kie la personoj kiuj ne volas plu daŭre konservi esperantaĵojn, sendu ilin al tiu adreso.
- starigo de koresponda servo, de vesperaj kunvenoj pli oftaj kaj pli interesplonaj de letervesperoj.
- starigi turisman servon kun informservo pri ferio-oblecoj en esperantujo (kalendaro de ĉiuj eventoj).
- ke la 15a de decembro estu digne kaj impone festata kiel Zamenhof- kaj librotago.
- interŝanĝi inter la membroj cirkulantajn leterojn kaj debatojn publikotaj poste en la bulteno.
- starigi libro-servon por ke oni profitu la rabatojn de la eldonistoj pro multnombraj mendoj de libroj (temas ĉefe pri kurslibroj, vortaroj, informiloj...)
- prelega servo : venigi prelegistojn el eksterlando kaj meti ilin je la dispono de la lokaj grupoj (necesas ke ni havu reton inter la grupoj por ke la prelegisto vizitu plurajn lokojn dum sia restado en Normandio.)

Pri la aktiva interna vivo de la asocio. : (Sekvo)

- Ke supra kaj malsupra Normandio estu reprezentataj en la asocia estraro mem :
(ekzemple ke estu vicprezidanto por supra Normandio kaj alia por malsupra Normandio).
- starigo, plifirmigo de novaj grupoj kie estas nun pluraj esperantistoj ne sufiĉe organizataj en rondo, kun helpo morala, materia, financa de U.N.E. kaj de la apudaj aliaj grupoj

- verki eldoni kaj sendi demandaron pri ĉiuj asocia membro por starigi kaj kompletigi ĝisdatigitan sliparon.

- sendi la bultenon al ĉiuj normandaj esperantist(in)oj membroj aŭ ne de la asocio.

- interŝanĝi ideojn spertojn inter grupoj ĉiuokaze.
- nur se tio eblas (tio dependas de la lokaj grupoj mem), inkluzivi la asocian kotizon de U.N.E. (vere modesta: 2 Frankoj jare nuntempe !) en tiu-ĉi de la loka grupo.

- FINE : se oni deziras ke ĉi malgranda parto de tiu longega listo da proponoj estu realigebla, same kiel ĉiuj sampecaj asocioj, nia unuigo bezonas iom da mono.... ĉiama rekantaĵo !.... ĉu la nuna kotizo sufiĉas por kovri la venontajn elspezojn? Eble ĝi ne estas sufiĉe alta. (Tamen ĉiuokaze ĝi devas resti modesta por ne konkurenci la aliĝajn ĝarajn kotizojn : grupa, nacia, internacia, faka).

- Antaŭ ĉio ni bezonas bazan agad- kaj laborplanon, kaj ni devu laŭlitere ĝin sekvi, kompreneble kun la helpo de ĉiu !

=====

Por la gejunuloj : Laŭ la programo de la Ruena Kongreso, faka kunveno okazos ek de la 16a sabato.

Jen estas kelkaj ideoj kiujn vi ek de nun povas pripensi. Se vi ne povos veni en Rouen, tamen bonvolu sendi al la ĉi-supra adreso viajn sugestojn por ke la kongresantoj povu ilin diskuti. Kompreneble plenkreskuloj povas sendi proponojn, ili estos bonvenaj !
En la venontaj numeroj de Normanda Bulteno la debatoj daŭros post la Ruena kongreso.

- organizi semajnfinojn pinikojn seminarietojn kun simpatia etoso.
- aperigi konstantan rubrikon en Normanda Bulteno. kaj regule ĝin nutri.
- ke kelkaj gejunuloj sin proponu por esti junuldelegitoj en la SAT kaj UEA jarli-

-broj..
- havi kontaktojn kun aliaj regionaj aŭ junulfakaj grupoj. § Pariza grupo, fervoj-
-istoj...)

- interŝanĝi ideojn proponojn kaj cirkulantajn leterojn.
- kompili ĝisdatigitan sliparon = sendi cirkuleron kaj demandaron al ĉiuj normandaj gejunuloj.

- aligi ĉiujn novajn gejunulojn al U.N.E. Precipe post la kursoj.
- kontakti persone la "malnovajn" gejunulojn kiuj forlasis la movadon.
- organizi imponan junularan renkontiĝon ĉu de JEFO, ĉu de SAT junulfako aŭ de alia faka junulasocio.

- verki broŝurojn por la novaliĝintoj.

- starigi grupetojn en la kadro de la lokaj grupoj.

- instigi la grupgvidantojn kaj la kursgvidantojn ke ili sendu la nomojn de la gejun-

-uloj por starigi la sliparon kaj por ke oni kontaktu ilin.

- organizi konstantan informkampajnon ĉe la necesperantistaj junularaj organizoj.

- regule informadi la naciajn kaj internaciajn esperanto-junular-organizaĵojn de niaj

agadoj. Aboniĝiajn revuojn kaj kunlabori.

- aktive partopreni la vivon de U.N.E.

Resume : ne apartigi la gejunulojn de la aliaj membroj de la asocio, sed dank'al trafa kunlaboro inter ĉiuj, kaj allogaj agadoj kiujn la junaj homoj ŝatas, ni ebligu ke U.N.E. ĉiam antaŭeniru, fosu sian sulkon, eliru sian eburan turon por la bona دنیا afero !

==O==O==O==O==O==O==O==O==O==O==

VIVO DE LA GRUPOJ.

- VIRE - La grupo realigis tre belan kaj imponan kongreson (vidu la raporton sur la 3a paĝo.

- LE HAVRE Sinjorino Beltier skribis pri Esperanto al la Prezidantoj de la respublikoj Francujo kaj Aŭstrujo. (Vidu la 2an paĝon.)

La 13an de Majo, Sro POTTIER, el Yvetot, prezentis diapozitivojn pri Gresillon en la Junulardomo antaŭ multaj ĉeestantoj. Poste, Sinjoro Guillaume parolis pri la agado de la delegitoj de U.E.A. dum la pasinta jaro.

- Yvetot.- En Aprilo, Sroj Leroux kaj Duchesne prezentis antaŭ ĉeestantaro bedaŭrinde tro malmulta tre interesajn diapozitivojn pri la kongresoj en Londono kaj Edinburgo.

- Rouen - La grupo aktive preparas la Kongreson de U.N.E. (vidu la antaŭajn paĝojn.)

	I	2	3	4	5	6	7	8	9	IO
a										
b						/				
c				/			/			
ĉ								/		
d		/			/					
e						/			/	
f			/							
g				/			/			
ĝ					/					
h										

(r.) = nur radikalo

(i.) = inversigita

HORIZONTALE :

- a - Afero de kuratoro
- b - Tâeda venteto - Antikva nomo de Ejro (R.)
- c - Oni diras "firma kiel ĝi " (r.) - Pronomo - Amantino de Zeŭso
- ĉ - Virnomo i.a; de pluraj papoj (r.) - Numeralo
- d - Scienca vortero signifanta : *animalo* - Granda fajenca vazeto (r.)
- e - Antikva greka monereto - Movo en la direkto (r.i.)
- f - Montra pronomo (r.) - Stilfiguro uzata por reliefigi neatenditan penson (r.)
- g - Konsumi - Refleksiva pronomo - Kion faris al la homoj L.L. Zamenhof (i.)
- ĝ - Li restadis 3 tagojn en oetaco - Akorda kun la leĝo (r.)
- h - scienca studo de la propraj nomoj

VERTIKALE :

- 1 - Grava krukstarbo
- 2 - Perei alfundiĝante (r.) - Bovo el Norda Ameriko (r.)
- 3 - Micetozo - Femalo /de iu -
- 4 - Neofociala sufikso uzata por signifi : apliki metodon elpensitan Mezurunujo de longo en Britujo - La 1a verbo kiun oni lernas (R.)
- 5 - Efektive - Kastrita taŭro (r.)
- 6 - Participa sufikso - Civitano el eŭropa lando (r.i.)
- 7 - Subjunktio - Determini la pezon de ĉi entenantaĵo, ~~en~~ kiu estas varo. - participa sufikso -
- 8 - Numeralo - Esti tia
- 9 - Kun Janeiro : havenurbo - Sinonimo de Cumo (i.)
- 10 - Dedicação

- Ŝaradoj au rebusoj, preparitaj de havraj ĝejunuloj :
(Atentu : la francaj silaboj fariĝos esp^a vorto)

I

Mia unua estas parto de la kapo
Mia dua estas besto kiu vivas
en kloakoj
Mia tria estas nombro
Mia kvara estas la kontraŭo de
malfrue
Mia tuto estas metio


VH.

2

Mia unua estas posesiva adjektivo
Mia dua estas ronda
Mia tria estas trinkebla
Mia tuto servas en lernejoj


VH

3



VH

4



X.C.

notetaz surtez tm = 4 (mi deziras gazeton)
jettin eni setse forit = 3 (libroj estas tre utilaj)
otnab - nae - etnab - tabulo = 2 (ta - boule - eau - tabulo)
otstebayk - tot - xis - ter - noe = 1 (cou - rat - six - tot - kuracisto)

SOLVOJ

CAR FINAS LA JORO 1972, NI DEZIRAS AL VI ĈIUJ :

AGRABLAN KRISTNASKON!
FELIĈAN NOVJARON!